

Esperanto kaj Interlingua, 6-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 715, 1977.06.22 & 24 & 25

Cl.- Parolas Claude Gacond. En la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista aperis kompara studo pri Esperanto kaj Interlingua, kiu bone komprenigas, kial la unua lingvo sukcesas, dum la alia nur povos malsukcesi. Ni raportas pri tiu ĉi 170-paĝa eseo laŭ resumo, kiun mem verkis ĝia aŭtoro Edo Bernasconi.

Jen kion Edo Bernasconi diras, pri la kritikoj kontraŭ la esperantistoj fare de la adeptoj de Interlingua:

« Ŝajnas, laŭ la adeptoj de Interlingua, ke por esti esperantisto, oni devas aparteni al mistera Zamenhofa religio, kiu havas sanktan libron nomatan Fundamento. Ke Zamenhof estis homo religia, tio estas vera. Sed Esperanto koncernas liajn ideojn esence homajn kaj humanismajn. Por li, kiel skribas Pierre Janton, esperantismo ne devis nur esti lingvo-teorio, sed ankaŭ doktrino pri ĝiaj celoj, kiuj formas humanismon. Li havis egalisman koncepton pri la homaro, certe Zamenhof estis unu el la unuaj, kiuj komprenis, ke la utiligo de tia lingvo kia Esperanto implikas la demokratigon de la kulturo kaj de la komunikado. Ĉar li tamen ne estis naiva, li sciis ankaŭ, ke tiu lasta celo estas alirebla nur je la finiĝo de longa procezo de transformiĝo de la institucioj kaj moroj, procezo, kiun Esperanto povas kun-ekfunkciigi, sed kies sola motoro Esperanto ne povas esti.

Por Zamenhof, do, la celo de internacia lingvo estis esence politika: permesi, almenaŭ je la nivelo de la internaciaj interŝanĝoj, ke la hom-amasoj povu liberiĝi je sia dependo el, de la privilegiitaj klasoj. La religio de Zamenhof, do, senvualiĝas kiel projekto de socia praktikado, kiu havas kiel finan celon la kunlaboron por la liberigo de la homo.

Kaj kio nun fariĝas la povra pseŭdo-korano de la esperantistoj? Oni scias, ke lingvo vivas sur socia interkonsento: nacia lingvo ĝenerale ne bezonas oficialigon de tia konsento, sed Esperanto, dua lingvo por ĉiuj parolantoj, devis je certa momento fiksigi certan bazon el vortoj kaj reguloj, kiuj estu devigaj por ĉiu, kiu volas partopreni la esperantistan kolektivon. Temas pri elementa problemo de lingva disciplino, kiu evidentiĝas de si mem, se ni observas, ke Esperanto estas transdonata al la novaj generacioj ne tra la familio - primara socialigo - sed tra rekta instruado - sekundara socialigo - en grupoj, lernejoj, aŭ simile.

Cetere tiu libreto Fundamento estas minimuma: ĝi fiksigas ĉirkaŭ 2'000 radikojn (en la hodiaŭa plej ampleksa votaro Esperanta la radikoj atingas 15'000) kaj dek seson da reguloj. Ĉio alia estas libera, interalie la riĉigo per novaj radikoj kaj la elprovo de novaj latentaj lingvo-eblecoj.

La adeptoj de Interlingua prezentas sian lingvon, kvazaŭ temus pri lingvo el tipo pli moderna ol Esperanto. Oni ne komprenas kial. Ambaŭ skoloj originis en la sama epoko, je la fino de la 19-a jarcento. Oni ne vidas esencan progreson inter la iama Mundolingue de J. Lott (1890) kaj la moderna Interlingua. Temas, ja, pri lingvo alitipa ol Esperanto, kaj dum la venontaj elsendoj ni vidos kial.

La adeptoj de Interlingua ankaŭ asertadas, ke inter la interlingvistoj ekzistas ĉiam pli forta altiro por Interlingua malprofite al Esperanto. Bedaŭrinde por ili, tio ne estas konstatebla. Se vere ekzistus tia altiro, kial la anoj de Interlingua, anstataŭ multiĝi, en pluraj landoj rekte malmultiĝas - inter alie en Svislando?

Ekzistas neniŭ evoluo de unu skolo al la alia: ili reprezentas du komplete malsamajn vidpunktojn, neredukteblajn unu al la alia.»

Pri tio ni parolos la venontan semajnon.

Vi aŭdis el Svislando partan prezenton de gravega verko de Edo Bernasconi titolita ‘Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj: Esperato aŭ Interlingua?’ Eldonis ĝin Kultura Centro Esperantista en sia kolekto Studoj. La franclingvanoj sciis, ke franclingva resumo de tiu ĉi verko aperis en la sama kolekto sub la titolo ‘Espéranto et Interlingua. Brève étude comparative’.

Prelegis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*